

Kun Stefano KELLER pri Esperanto en Srilanko

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 124-1-780, 1984

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-124/Radiokasedo-124-1-780-Claude-GACOND-Kun-Stefano-KELLER-pri-Esperanto-en-Srilanko.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ mi havas la honoron havi kun mi sinjoron Stefano Keller, la esperanto-instruisto ĉe Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Kiam li ferias, tiu esperanto-instruisto ne forlasas la internacian lingvon. Kontraŭe, li flugas al fora lando por provi tie okazigi esperanto-kurson, ĉu ne?

SK.- Jes. Fine de la pasinta somero mi ekplanis vojaĝon al Srilanko. Ke mi povu bone kombini mian feriadon kun poresperanta agado, mi klopodis akiri multajn informojn pri tiu lando kaj mi ekinformiĝis pri la tiea situacio de esperanto. Unue mi kontaktis s-ron Dharmatilake, delegiton de UEA en Kolombo. Li skribis al mi:

«Esperanto ne moviĝas ĉi tie. Homoj estas klopodemaj serĉante manĝaĵojn. Do en tia lando la progreso de esperanto ne povas okazi. Se el tiu lingvo rezultus tuja alporto de mono... Certe vi venu, esperantistojn en Srilanko vi povos renkonti, mi helpos vin en tio. Mi provos altiri ilin. Ne estas malfacile. Estas nur unu, du aŭ tri...» - tiel skribis li.

Do, mi antaŭvidis malfacilan laboron tie, konsiderante la vortojn de s-ro Dharmatilake. Samtempe tra la amaskomunikiloj oni sciiĝis en tiu tempo nur pri teruraj eventoj, kiuj ĉion haltigis, malhelpis evolui, interalie la esperanto-movadon. Dum kunveno en la loka grupo de Amnestio Internacia en La Chaux-de-Fonds, ni pritraktis informojn pri danĝera situacio, murdoj, detruoj, manko de publika sekureco en Srilanko. Sekve mi malcertiĝis pri proksima realigo de tiu vojaĝo.

Cl.- Do, kio estis ekzakte la kaŭzoj de tiuj konfliktoj, kiuj faris, ke vi hezitis iri al Srilanko.

SK.- Mi skribis leteron ankaŭ al s-ro Jesudasan, delegito de UEA en Nugegoda, kiu sendis al mi raporton pri la okazintaĵoj.

Cl.- Ĉu vi povas citi el tiu letero ?

SK.- Jes, sonas jene:

«En 1956 la tiama registaro estis devigata plenumi sian promeson al la sinhalaj voĉdonintoj kaj proklamis la sinhalan oficiala lingvo de Srilanko. La tamila popolo en la norda parto de la lando forte protestis kontraŭ la altrudita lingva diskriminacio, sed la registaro havinte absolutan plimulton en la parlamento montris indiferecon al la plendoj. Ĉiuj sekvantaj registaroj havis la saman sintenon. Sekve, inter tamiloj iom post iom kreskis malkontentiĝo kaj malfido. Aperis tiel nomata apartisma movado kaj ankaŭ tamilaj teroristoj, verdire malgranda nombro de seniluziigintaj junuloj senlaboraj pro nescio de la oficiala lingvo, kiuj volis agi ĉiuriske. La registaro ekspedis soldatojn por kontroli ilin. Kaj dum la pasintaj du jaroj okazis kelkaj konfliktoj inter teroristoj kaj soldatoj. Ĉe la konflikto okazinta la 23-an de julio 1983, 13 sinhalaj soldatoj estis murditaj, kaj preskaŭ tuj la terura pogromo komenciĝis ĉie, por instrui lecionon al la tamiloj. Komence tridekkvin tamiloj, kiuj estis en malliberejo en Kolombo, estis murditaj de siaj sinhalaj kunuloj. Post kelka tempo dekok pliaj tamilaj internuloj suferis saman sorton. Ekstere, en la stratoj, sinhaloj atakis senkulpajn tamilojn per tranĉiloj, hakiloj, glavoj, ktp., kaj bruligis iliajn vendejojn kaj domojn.»

Cl.- Tio fakte rememorigas la vortojn de Zamenhof: „En la stratoj de mia mafeliĉa urbo de naskiĝo, sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetis kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon ol tiuj sovaĝuloj.“ Ĉu ne, Stefano Keller, nenio nova sub la suno! Lingvaj konfliktoj restas.

SK.- Jes. Aŭdu, kiel daŭrigas s-ro Jesudasan en tiu raporto:

«Multaj homoj, virinoj kaj infanoj inkluzive, frontis torturan morton ĉe la manoj de la tumultanoj, kiuj kun frando, kvazaŭ diabloj venintaj el la infero, verŝis benzinon sur la vivantajn piedirantojn, bruligis ilin senkompato. Ankaŭ centoj da aŭtoj estis bruligitaj. Iufoje kun veturantoj interne. La tuta kulpo de la koncernitaj viktimoj konsistis en tio, ke ili parolis tamile aŭ ke iliaj antaŭuloj estis tamiĵoj. Estas menciinde, ke en la sinhalaj regionoj loĝas multe da tamiĵoj, ĉiam en plena amikeco kun siaj sinhalaj najbaroj, kontribuante multe al la bonfarto de la sinhala komunumo, lernigante la sinhalan al siaj infanoj. Fakte, ili ne havas ian ajn rilaton kun tamiĵoj de la nordo, aŭ kun tiuj, kiuj postulas apartismon. Multaj naskiĝis en la sinhalaj regionoj, eĉ estas edziĝintaj al sinhaloj kaj vivas kiel tiuj. Sed laŭ la tumultanoj, ankaŭ ĉiuj tiaj homoj devas esti punitaj.»

Cl.- Kaj, ĉu s-ro Jesudasan mem suferis okaze de tiuj lingvaj konfliktoj ?

SK.- Li, estante tamiĵo, ne evitis la suferon. Jen la diroj de s-ro Jesudasan :

«Ankaŭ mia propra domo estis atakita de la tumultanoj, kies grupo nombris pli ol 200 personojn. Ili difektis ĉiujn pordojn, fenestrojn kaj aliajn posedaĵojn, verŝis benzinon sur la objektojn kaj sur la tegmenton, kaj ekbruligis ĉion. La meblojn, la pianon, la aŭton kaj eĉ amason da libroj. Nur pro la graco de dio ĉiopova, kun nuraj vestaĵoj korpe surmetitaj mia edzino, kvin infanoj kaj mi eskapis de la tortura morto al la rifuĝejo, kie ni pasigis sekvantajn tagojn kun miloj da aliaj similaj viktimoj. El la domo, kie ni loĝis 18 jarojn, restis plejparte nur karbitaj muroj sen tegmento. Niaj kvar dormoĉambroj, komuna ĉambro, banĉambro kaj garaĝo estas komplete forbruligitaj.»

Cl.- En tiu raporto s-ro Jesudasan verŝajne ankaŭ parolis pri la esperanto-vivo en Srilanko. Ĉu vi povas citi el lia letero ?

SK.- Jen kelkaj vortoj el tiu raporto pri la esperanta vivo:

«Ekde januaro 1979, kiel sola funkcia aktivulo en Srilanko, mi respondecis pri la ununura esperanto-grupo, kiu dum tri jaroj ofte kaj regule kunvenis kaj funkciis kontentige. Por ekzerci sin en la lingvo, la grupanoj ĉiam entuziasme deziris renkonti alilandajn esperantistojn, inter miloj da homoj, kiuj jaron post jaro venis al nia lando turisme, sed bedaŭrinde ne realiĝis tio. Kiam mi mem estis preskaŭ rezignanta pri tiaj klopodoj, dank' al s-ino Kazuko Kikusima el Japanio, aperis anonco en la revuo Esperanto en 1982 julio. Leginte ĉi tiun rubrikon, du samideanoj tuj kontaktis min menciante, ke ili esperas viziti Srilankon estonte. La leteroj kuraĝigis min konstrui unu plian ĉambron kun tualetejo kaj duŝo por la ekskluziva loĝigo de esperantistoj dum ilia restado en nia lando. Mi revis, ke la ĉambro baldaŭ povos funkcii kiel esperanto-informcentro en Srilanko, por diskonigi informojn pri esperanto al niaj homoj kaj helpi ilin lerni la lingvon. Kiam mi estis pretiganta la ĉambron, je mia ĝojo, alvenis tre entuziasma esperantisto, s-ro Euĝeno Mustea el Svedio. Li loĝis ĉe mi en la verde kolorigita esperanto-ĉambro preskaŭ kvar semajnojn. Ni kune vizitis aliajn esperantistojn kaj prezentis kelkajn esperanto-librojn al la Publika Biblioteko en Kolombo. El la bruligitaj ĉambroj la esperanta estas nur parte difektita, kvankam detruigis ĉiuj aksesorajoj

en la alligita tualetejo. Ĉar mi ne perdis mian entuziasmon por esperanto, mi tre ĝojus, se mi povus ripari tiun ĉi ĉambron kaj tualetejon por ke mi povu restarigi ilin por la intencitaj celoj. Sed, bedaŭrinde, tio estas super miaj nunaj rimedoj.»

Cl.- La venontan semajnon mi petos al Stefano Keller rakonti pri sia alveno en Srilanko kaj pri sia tiea poresperanta laboro.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond diras al vi: Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aprilo 2014*